**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 37

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Kapo majesta, sed cerbo ␣ ␣ **d** ␣ **st** ␣.
**2.** ␣ ␣ **j** ␣ ␣ hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno.
**3.** La 18an de januaro mi faris tion, kion miaj hejmanoj opinias kaprico kaj **f** ␣ **nt** ␣ **z** ␣ ␣: mi aĉetis poŝkomputilon.
**4.** La teatraĵo estas akra **s** ␣ **t** ␣ **r** ␣ pri la komunista burokrataro.
**5.** Sinjoro Saboleosky forgesis mencii, ke la naskiĝtaga infano estas ␣ **nv** ␣ **l** ␣ **d** ␣ kaj la Zagrebaj solistoj neniam antaŭe muzikis por handikaphava knabo.
**6.** La fantazio de kelkaj personoj vidis en tiu neordinare granda varano iun drakon, iun travivintan dinosaŭron, iun hororan ␣ ␣ **ns** ␣ **r** ␣ ␣, kiu sukcesis travivi la tempojn.
**7.** Miaj genepoj ja konas neĝon kaj glacion, sed sledi ili ofte povas nur dum unu tago, ĉar la postan neĝo jam fordegelas kaj glitkuri ofte ili povas nur en **st** ␣ **d** ␣ ␣ **n** ␣ kun artefarita glacio.
**8.** Ĉiuj kvadrataj malgrandaj grizaj tomboŝtonoj havas en la supra parto insignon de iu armea **r** ␣ **g** ␣ **m** ␣ **nt** ␣ aŭ korpuso, ĉiuj aspektas tre novaj.
**9.** **Z** ␣ **n** ␣ ␣ iĝas fleksebla, lamenigebla, rulpremebla jam je ĉirkaŭ 130 celsiaj gradoj.
**10.** Apenaŭ estis en Esperantujo gazeto pli ␣ ␣ **p** ␣ **l** ␣ **r** ␣ ol *Heroldo,* kiu estis la plej konsekvenca protagonisto de la sendependa ĵurnalismo en Esperantujo.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Konsiderante ĉiujn “mezurilojn” oni povas **k** ␣ ␣ **kl** ␣ **d** ␣, ke malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj la movado en Kolombio denove disvolviĝas – ne tro rapide, sed ja tutfirme kaj esperplene.
**2.** La junulo etendis sian manon, kaj la hundido provis leki liajn fingrojn kaj malforte pepis, la vosto de la hundido malforte **sv** ␣ **n** ␣ ␣ ␣ unu-dufoje.
3. En ĉiuj organoj de UN, kun la **e** ␣ **c** ␣ **pt** ␣ de la Internacia Kortumo, la oficialaj lingvoj estas la ĉina, angla, franca, rusa kaj hispana.
**4.** Atatürk konsideris la **a** ␣ ␣ **pt** ␣ ␣ de la eŭropa alfabeto kiel unu el la gravaj “modernigoj”, inter kiuj estis malpermeso de portado de fezo.
**5.** Mi malŝatis **fr** ␣ **k** ␣ **s** ␣ la helikojn, sed al la malgranda Maria tio tre plaĉis, eĉ kiam ni promenis laŭ la trotuaro, ŝi paŝis sinue por surtreti kiel eble plej multajn.

**6.** Eĉ la modela imperio de malbono, Sovetio, **p ␣ nt ␣ ␣** pri stalinismo en 1956 – kvankam malfrue kaj nur parte, tri jarojn post la morto de la tirano.

**7.** Nia ŝipo *Sea Spirit* ne dronis, sed pluraj el la pasaĝeroj volonte **r ␣ z ␣ gn ␣ ␣** pri sia lunĉo aŭ vespermanĝo pro stomakaj problemoj.

**8.** Multfoje oni jam konstruis domojn sur forgesitaj rubodeponejoj, la rubogasoj tiam povas **p ␣ n ␣ tr ␣** en kelojn kaj kaŭzi malsanojn de la enloĝantoj.

**9.** En Memfiso oni ree komencis observi Phut, sed trovis nenion; oni nur **k ␣ nj ␣ k ␣ ␣ ␣**, ke li devas esti granda sinjoro, ne simpla burĝo.

**10.** Bedaŭrinde, nia eksa ministro pri defendo sidas en arestejo kaj atendas **pr ␣ c ␣ s ␣ ␣** pro grandskala fraŭdado.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| frit', konfit', konkur', flirt', sku', balanc', medit', ramp', maĉ', regal'. |
|---|

1. La konsilio de Belfasto, la ĉefurbo de Nord-Irlando, voĉdonis por ĉesigi la konstantan **␣ ␣ ␣ r ␣ ␣ g ␣ ␣** de la brita flago ĉe la urbodomo.
2. Ni esperas, ke vi ŝatos la strang-etosajn verkojn, kiuj **␣ ␣ l ␣ ␣ ␣ ␣ ĝ ␣ ␣** sur la rando inter la realo kaj fantazio.
3. En la publikigita filmeto oni vidas, ke fajro flamigita per alkoholo ene de **␣ ␣ ␣ t ␣ l ␣** estas estingata danke al la ritma disvastiĝo de malaltaj frekvencoj.
4. Lia dolĉa plado estis ornamita per **␣ ␣ ␣ f ␣ ␣ ␣ ĵ ␣** el ruĝa ribo, konforme al la koloroj de la pola nacia flago.
5. La celo de *Trans-Pacifika Partnereco* estis, krei zonon, kie entreprenoj libere kaj justece **␣ ␣ ␣ k ␣ ␣ ␣ d ␣** tiel, ke la ekonomia kresko kaj bonstato de tiu zono rapide antaŭeniru.
6. La fiŝkaptisto foriris malkuraĝe, li tremis pro timo, liaj genuoj kaj kruroj **␣ k ␣ ␣ ĝ ␣ ␣**.
7. Vi vivas trankvile hejme, en via **␣ ␣ d ␣ ␣ ␣ d ␣** jen pri Ligia, jen pri la kristanoj, do vi ne scias verŝajne, kio okazis antaŭ kelkaj tagoj.
8. En la korton eniris du dresistoj de serpentoj kun sako plena de venenaj **␣ ␣ ␣ p ␣ ĵ ␣ ␣** kaj komencis spektaklon.
9. Iafoje ni havas dekon da gastoj, kaj ilia **␣ ␣ ␣ ␣ l ␣ d ␣** per ĉokolado, kukoj ktp. kostas al ni ne pli ol 2 dolarojn.
10. La malkombino de la plasto ne okazas nur mekanike, pere de la **␣ ␣ ĉ ␣ d ␣** fare de larvoj, sed laŭ aparta kemia procedo.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** Publikaj lernejoj plejparte provizas edukadon ___ laŭ la kulturo de la regantaj klasoj kaj etnoj, kaj kiuj allasas precipe aprobitajn verojn, konformajn al ties ideologia sistemo.

**a.** tajlitan **b.** frititan **c.** paŝtitan **d.** konfititan

**2.** La tagaj birdoj prepariĝis al la dormo, la noktaj vekiĝis en la kaŝejoj, en la dezerto ___ la hienoj kaj ŝakaloj, kaj la dormetanta leono streĉis siajn potencajn membrojn.

**a.** penetris **b.** ribelis **c.** oscedis **d.** velkis

**3.** Kiam mi vidas, ke por Stefankarlo, mia amika estro, estas tempo ___, mi kuras al la kantino, kaj alportas al li tason da kafo kun tiu kuko, kiun li amas.

**a.** adopti **b.** paŭzi **c.** komisii **d.** pruvi

**4.** Post vizito al la trinkeja necesejo, kiu malpezigis lian ___, li proksimiĝis al la verŝejo, kaj replenigis ĝin per kelkaj pajntoj da bona irlanda portero.

**a.** vezikon **b.** teatron **c.** tendon **d.** ŝtalon

**5.** La unua en Eŭropo kontraŭulo de fumado de tabako, Jakobo I, sin esprimis: “La ___ fumi tabakon estas abomena kaj danĝera tiel por la kapo, kiel ankaŭ por la pulmoj.”

**a.** benzino **b.** kliento **c.** tajloro **d.** pasio

**6.** La angla ___ de tiu ĉi libro – *Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj*, verkita de Leah Levin, estis unuafoje eldonita de Unesko en 1981.

**a.** bebo **b.** originalo **c.** tempesto **d.** apetito

**7.** Kiam sciencistoj esploris la ĉelan ___ de kancero, ili malkovris, ke dum la dividiĝo de kancera ĉelo, la telomero perdita estas tuj riparata.

**a.** kajon **b.** pasion **c.** ŝraŭbon **d.** mekanismon

**8.** La germana kanceliero Gerhard Schröder per la tuta pezo de sia ofico oficiale ___, ke en la tutglobigita mondo la angla “ne plu estas fremda lingvo, sed dua lingvo”.

**a.** karesis **b.** lekis **c.** deklaris **d.** afrankis

**9.** La komisiono de UEA bedaŭris, ke pro manko de alikontinentaj petoj ĝi devis ___ la subvenciojn ĉefe inter eŭropaj bibliotekoj.

**a.** dungi **b.** ĉagreni **c.** knedi **d.** distribui

**10.** La konduto de la japana registaro baziĝas sur la fakto, ke ĝi daŭre intencas ___ de nuklea energio, sed ankoraŭ ne povas decidi la proporcion inter la tuta energio kaj la nuklea.

**a.** dependi **b.** ilustri **c.** knedi **d.** asekuri